Francilia federacio
KomitatKunsido (KK) 13/01/2023

Partopreno (rete)

- Raymonde Coquisart (RC) ĉeestas
- Pierre Gauthier, eks-vic-kasisto (PG) ĉeestas
- Marc Giraud, eks-prezidanto (MG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aleks Kadar (AK) eks-vic-sekretario ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, eks-kasisto (DL) ĉeestas
- Kévin Morel-Fourrier (KMF) malĉeestas
- Laure Patas d'Illiers, eks-sekretario (LPI) ĉeestas
- Marianne Pierquin (MP) eks-vic-prezidanto ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) ĉeestas

Ekde la antaŭa kunsido

La protokolo de la KK de la 13/01/23 estis aprobita kaj enretigita al https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj

La Ĝenerala Asembleo okazis 18/03/23, la protokolo estas finpreparota.

La pasinta semajnfino plenplenis je eventoj. Debora reprezentis Romon. 24 esperantistoj venis al la Esperanto-kafejo, interalie ukrainino Oksana kun infanoj kaj du novbakitaj gejunuloj. GVN kontaktos ilin kaj informos ilin pri niaj eventoj, ĉefe pri la ludsesioj.

Elekto de la estraro

- prezidanto, kandidatoj : MG
- vic-prezidanto (nedeviga), kandidatoj : MP
- kasisto, kandidatoj : DL
- vic-kasisto (ne deviga), kandidatoj : PG
- sekretario, kandidatoj : LPI
- vic-sekretario (ne deviga), kandidatoj : AK

Ĉar estas nur po unu kandidato por unu posteno, eblas bloke voĉdoni.

1 sindeteno 10 konsentoj 0 malkonsento

La nova komitato estas elektita, gratulon.

La sekretario sendos al Espéranto-France la listojn de la nova komitato kaj la nova estraro.

Reprezentanto ĉe Espéranto-France

PG konsentas plu reprezenti nian federacio ĉe Espéranto France.

Pritraktendaj estas:

- la sumo dispartigata kiam iu aliĝas (vidu protokolon de la ĜA)
- ne-partopreno al prizorgado de la volontuloj dungotaj de Espéranto-France

Respondeculoj pri informkanaloj

La unua kanalo estas la retejo https://esperanto.paris la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- Retejo DJ https://esperanto.paris/
- Facebook MG DL MP https://www.facebook.com/esperanto.paris
- Twitter.com PG (AL) https://twitter.com/esperanto_paris
- Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
- Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
- Telegramo AL https://web.telegram.org/z/#-1081874369
- Amikumu LPI https://amikumu.com/
- Eventa Servo MG AK DJ https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris
- Meet-Up DJ https://www.meetup.com/fr-FR/Esperanto-Paris/

Respondeculoj pri agadoj

- Ĝemelurbo kun Romo: MG
- Legoklubo: MG
- Ludoj: AL kun Marielle Martin ĝis junio, AL dubas pri daŭrigo venontjare
- Ekzamenoj: FLJ
- Esperantokafejo: GVN
- Espéranto café croissant: GVN
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier
- Prelegturneoj: FLJ

Notu bone 1e: post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org por publikigo en la reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

Notu bone 2e: Michèle Abada-Simon pretas ĉeesti niajn eventojn, necesas informi ŝin antaŭe kaj rememorigi ŝin la tagon de la evento, ŝia telefononumero estas 09 54 02 85 12

Novaj proponoj

Subvencio

Doni 50€ - 100€ al Balotilo kaj Framasoft, ĉar nia federacio uzas iliajn ilojn.

- Pri Balotilo, DL proponas alian sumon: 25€. MG: ni voĉdonu inter 3 proponoj, 0€ (0 voĉo), 25€ (2 voĉoj), 50€ (8 voĉoj), 1 sindetenas. La komitato plimulte elektas la proponon 50€
- Pri Framasoft, DL proponas alian sumon: 25€. MG: ni voĉdonu inter 3 proponoj, 0€ (0 voĉo), 25€ (3 voĉoj), 50€ (5 voĉoj), 3 sindetenas. La komitato plimulte elektas la proponon 50€

Krei 2 novajn respondecojn

- reprezentanto de nia federacio ĉe la lokaj oficialuloj (urbodomoj de Parizo kaj de Paris-Centre): reklami pri niaj eventoj en ilia dissendolisto (nun DL prizorgas) kaj iliaj surstrataj tabuloj, informiĝi pri eventoj al kiuj ni povos partopreni, obteni monon por niaj projektoj... Neniu voluntulas, defaulte la prezidanto plimalpli faros
- reprezentanto de nia federacio ĉe la lokaj franciliaj kluboj: kontakti la klubojn, ĝisdatigi nian retejon pri ili, informiĝi pri lokaj iniciatoj nekonataj, instigi neparizanojn al kreado de novaj grupoj eĉ ne formalaj... RC voluntulas

Plibonigi la retejon esperanto.paris

- [Rememorigo] Ĉe la hejmpaĝo, krei ligilojn facile videblajn al niaj kanaloj ĉe FB, Twitter, Mastodon, Telegram, Meet-up, tiel ke la vizitantoj de nia retejo tuj abonu al sia(j) plej ŝatata(j) socia(j) reto(j) kaj ricevu senprokraste informojn pri niaj eventoj. Tio malhelpas ilin nek regule viziti nian retejon, nek aboni nian dissendoliston. Krei RSS fluon ankaŭ povas esti pristudita. DJ faros
- La kadro " Calendrier " (https://esperanto.paris/?departement=75) postulas unue elekti departementon. Laŭ la nuna aktiveco de aliaj franciliaj kluboj ligitaj al nia federacio, tiu etapo aperas senutila. Pli bonus kaj simplus meti ligilon al

eventaservo kiel tiun : https://eventaservo.org/E%C5%ADropo/Francio/Parizo (kiu ankaŭ reklamas por aliaj parizaj kluboj) aŭ tiun https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris (nur pri ni). Fakte la kadro " Calendrier " ne vere informas pri estontaj eventoj sed pri kursoj de aliaj kluboj. Do kial ne krei rubrikon " Apprendre l'espéranto en Île-de-France " por tiuj informoj ?

=> DL petos Emmanuelle Richard ŝanĝi la titolon "Calendrier" al "L'espéranto près de chez vous".

Projekto: partopreni la eventon Jardin des Langues

La evento estas jene anoncita https://www.unidivers.fr/event/le-jardin-des-langues-un-moment-linguistique-et-convivial-mediatheque-marguerite-yourcenar/ :

Le jardin des langues : un moment linguistique et convivial Médiathèque Marguerite Yourcenar, 3 juin 2023, Paris. Vous apprenez une langue, vous voulez en découvrir une nouvelle ? Vous avez envie de partager et de faire découvrir votre langue natale et votre pays ? Le Jardin des Langues est fait pour vous ! Exercez-vous à la pratique d'une langue étrangère : pendant une dizaine de minutes, discutez avec un natif dans sa langue natale ! Si vous ne pouvez pas encore converser, pas de panique, vous pourrez découvrir la langue de votre partenaire et pourquoi pas, apprendre les premiers mots de base. Si vous souhaitez faire découvrir votre langue maternelle, vous pouvez vous inscrire en envoyant un courriel en indiquant votre nom, la langue que vous proposez et votre heure d'arrivée. Rendez-vous au jardin de Margot pour un moment convivial d'échange linguistique ! Un évènement proposé par le pôle langues de Yourcenar : retrouvez la présentation de tous les pôles langues ! Samedi 3 juin 2023 de 15h à 17h Jardin de Margot Public ado-adulte Entrée libre. Médiathèque Marguerite Yourcenar 41, rue d'Alleray 75015 Paris. 01 45 30 71 41. Contact : https://www.paris.fr/equipements/mediatheque-marguerite-yourcenar-6218 mediatheque.marguerite-yourcenar@paris.fr https://www.facebook.com/MediathequeMargueriteYourcenar

Ĉu "un natif dans sa langue natale " estas nepra kondiĉo por partopreni? Se jes, ĉu Viktoro bonvolus partopreni? LPI kaj AK prizorgos la aferon.

Disdonado de libroj al publikaj bibliotekoj

PG atentigas la komitaton pri grava paĝo pristudinda por nia projekto "disdoni librojn al publikaj bibliotekoj" : https://bibliotheques.paris.fr/Default/apprendre-une-langue.aspx

Ekzistas 8 bibliotekoj "Pôles langues" kiuj estos probable niaj unuaj celoj. Unue, necesas serĉi ĉu ili jam havas kurslibrojn de Esperanto. Se ne, kiu(j)n libro(j)n elekti? Metodo 11, Stranga malapero, Esperanto débutants de Assimil, alian? PG opinias ke ni donacu unu kurslibron + unu vortaron FR-EO – EO-FR.

Pri la parto "Apprendre une langue en ligne", verŝajne ni ne povas agi ĉar la decidon faros nur la bibliotekoj. Pluraj bibliotekoj, ne nur en Parizo, proponas "Assimil - Apprendre une langue en ligne"; ili rekte kontraktas kun Assimil. Tiukaze ĝenerale troviĝas ĉiuj lingvoj ekzistantaj ĉe tiu metodo. Sed bedaŭrinde Esperanto ne (ankoraŭ) lerneblas rete ĉe Assimil.

Pri la parto, " Lire en langues étrangères ", eblas disdoni kelkajn verkojn originale en Eo aŭ tradukojn de famaj verkoj (ekz. La eta Princo, Tinĉjo).

Pri Esperanto-libroj jes utilus sed mi ne scias kiel funkcias parizaj bibliotekoj kaj kiel proponi tion. Tiukaze prefere libroj eldonitaj de eoFR ne de Assimil. Estas la laboro de Assimil proponi siajn librojn. Tamen povas esti interese profiti el la reputacio de Assimil pri lingvoinstruado, kiun ne havas EoFR , por konvinki bibliotekistojn akcepti libron pri Eo. Temas pri promocii Esperanton ĝenerale, ne pri promocio de la eldonbranĉo de EoFR.

Ni jam aĉetis 10 libretojn Metodo11 por donaci al bibliotekoj (vidu https://esperanto.paris/IMG/pdf/2022-12-02.pdf).

Projektoj

- Matematika foiro 25-28 de majo en place Saint Sulpice: FLJ prizorgos, necesas deĵorontoj
- Kontakti la mezlernejojn: GVN ne rezignas sed nun ne havas tempon
- Kontakti la publikajn bibliotekojn: MP ne rezignas sed nun ne havas tempon
- Subglasoj: GVN
- Vojaĝoj de Lucien Péraire: Régis Fournier kreis filmeton spekteblan en nia retejo: https://esperanto.paris/lucien-peraire. Okazos ekspozicio fare de Pascal Dubourg-Glatigny : kvar paneloj pri Péraire estos ekspoziciitaj en la stacidomo de Versailles-Chantiers inter pluraj aliaj pri agadoj de CNRS (verŝajne ekde la 11-a de aprilo, dum unu monato)
- Ministerio pri financaj aferoj (ties kultura francilia biblioteko "Place des arts"): DL, LPI

Retpoŝtadresoj (informo)

3 adresoj kreitaj de nia federacio, administrataj de prezidanto kaj sekretario

- estraro-francilio@googlegroups.com resendas al ĉiuj estraranoj
- komitato-francilio@googlegroups.com resendas al ĉiuj komitatanoj
- membraro-francilio@googlegroups.com resendas al la membroj aliĝintaj por la jaro 2022-2023 (mane ĝisdatigata ĝis 18/03/23 sed ne poste)

Adreso kreita de nia federacio

- amikaro-francilio@googlegroups.com resendas al ĉiuj interesatoj pri niaj eventoj, iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi. PG aldonis la retadresojn de siaj lernantoj. Ĉu la aliaj instruistoj faris same ? Bv kontroli.

Adreso kreita de Espéranto-France, ne uzita

- francilio@esperanto-france.org iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi, vidu ĝian priskribon https://esperanto-france.org/sympa/info/francilio LPI petis ke tiu listo estu aŭtomata listo de niaj membroj sed Espéranto France nee respondis

Kontaktadreso de nia retejo esperanto.paris, la resendadon administras Emmanuelle Richard

- info@esperanto.paris resendas al la estraranoj kaj Said Baluŝi

Venonta KK

KK okazas trimestre. La venonta KK okazos 09/06/2023 je la 7-a ptm kaj duono, mikse (t.e. kaj rete kaj surloke).

FINO DE LA KK